

Studo de Ulrich Lins publikigita de *L'Omnibuso*
La danĝera lingvo Esperanto en la uragano de persekutoj, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 553, 1974.05.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉerpante el la bone dokumentita libro de Ulrich Lins, *La danĝera lingvo Esperanto en la uragano de persekutoj*, ni hodiaŭ raportos pri persekutoj de Hitler kaj de la naziismo kontraŭ Esperanto.

A.- La germana faŝismo estas la unua reĝimo, kiu sisteme batalis kontraŭ la esperanto-movado. La radikoj de la persekutoj dum la naziismo troviĝas ĉe Adolf Hitler mem.

Cl.- Jam en 1922, en parolado prononcita en Munkeno, Adolf Hitler agitis kontraŭ Esperanto. Jen liaj asertoj :

A.- « *La marksismo fariĝis la apelanto de la laboristoj, la framasonismo servis kiel fermentilo por la « spiritaj » tavoloj, « Esperanto » estis faciligonta la « interkompreniĝon».*

Cl.- En 1925 Adolf Hitler precizigis sian penson en sia verko *Mein Kampf* (Mia Batalado), Ni citas lin :

A.- « *Tiom longe, kiam la judo ne fariĝis la mastro super la aliaj popoloj, li vole-nevole devas paroli ilian lingvon, sed tuj kiam tiuj estus liaj servutuloj, ili ĉiuj devus lerni unu universalan lingvon (ekzemple Esperanton), tiel ke ankaŭ per ĉi tiu rimedo la judaro povus regi ilin pli facile ! »*

Cl.- Fakte, Adolf Hitler nur redonis, en demagogia formo, vaste regantan opinion, resumante popularajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto inter konservativuloj kaj faŝistoj tra Eŭropo.

A.- Jen tre resume, kiel disvolviĝis la kondamno de Esperanto en la Tria Regno :

Cl.- En marto 1933 estis disbatitaj la organizoj **Germana Laborista Esperanto-Asocio** kaj **Socialista Esperanto-Asocio**, per kio preskaŭ tri kvaronoj de la esperantistoj en Germanio perdis sian organizan bazon.

A.- **Germana Esperanto-Asocio**, la neŭtrala organizaĵo, klopodis transvivi tiun persekuton per ĉiam pli forta adaptiĝo al la postuloj de la nazia reĝimo. Du jarojn poste **Germana Esperanto-Asocio** eĉ akceptis elpeli siajn judajn membrojn kaj aldonis kiel statutan celon : disvastigi la nacisocialisman mondkoncepton. Bela neŭtraleco !

Cl.- Sed la saman jaron, tio estas en majo 1935, dekreto de la edukministro Bernard Rust signifis unuan gravan baton kontraŭ la restinta movado. Ni citas :

A.- « *Flegado de artefaritaj mondhelplingvoj kiel la lingvo Esperanto ne havas lokon en nacisocialista ŝtato. Ilia uzado kondukas al malfortigo de esencaj valoroj de nacia ecaro. Sekve oni evitu ĉian akceladon de instruado pri tiaj lingvoj, porinstruitaj klasoj ne estas disponigataj por tiu celo. »*

Cl.- Unu jaron poste, tio estas en februaro 1936, la dekreto numero 29/36 diris :

A.- « Ĉar la kreo de internacia mikslingvo kontraŭas al la bazaj konceptoj de la nacist-socialismo kaj finfine povas servi nur al supernaciaj potencoj, la anstataŭanto de la Führer malpermesas al ĉiuj partianoj kaj membroj de la organizoj filiigitaj al la partio apartenon al ĉiuspecaj unuigoj de artefarita lingvo. »

Cl.- En aprilo 1936 interna cirkulero de la Politika Polico rajtigis la lokajn Gestapo-oficejojn dissolvi unuopajn grupojn esperantistajn, kies membroj agis aŭ ankoraŭ agas kontraŭ la ŝtato.

A.- Fine la 20-an de junio 1936 Reinhard Heydrich, nome de Heinrich Himmler, dekretis ke ĉiuj unuigoj de artefaritaj lingvoj kaj iliaj subgrupoj devas esti likviditaj proprainiciate ĝis la 15-a de julio 1936, do en malpli ol unu monato.

Cl.- De tiam silentis esperanto en Germanio kaj abundas la esperantistoj, kiuj pereis en la mortigejoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni raportos kiel la nazia Germanio devigis la okupitajn kaj amikajn landojn same malaperigi la esperanto-movadon.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!